# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - PERPIGNAN (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

N° 17 ---------------- RAPORTO PRI LA AGADO ---------------- 2-a trimestro 1965


## BEZIERS

Vivo de Esperanto : La esperantistoj en Béziers starigis grupon ĉe la komenco de oktobro 1964. Tuj post ĝia starigo la grupo sin montris vigla, kaj organizis kun helpo de S-ro Lentaigne el Montpellier sukcesan informkunvenon. Ekde la 15-a de novembro ĝi malfermis du kursojn : unu en la junulina mezlernejo, alia en la centro de la urbo; entute 15 gelernantoj kaj kelkaj plenaĝuloj, kiuj lernas korespondade. Jam funkcias korespondado inter nia kurso kaj ĉekoslovaka kurso. Tiu unua rezulto estas kontentiga kaj kuraĝiga. Antaŭen !

J. CASTELLO

## MONTPELLIER

Agrabla jarfino : Sabaton la 19-an de decembro la Montpelliera grupo digne festis la Zamenhofan Tagon. Je la kvina vespere en nia sidejo, nia prezidantino malfermis la kunvenon; ŝi deziris agrablan restadon al nia amiko, S-ro Pragano. Poste P-ro Pragano ravis nin per prelego pri Zamenhof kaj pri la progreso de Esperanto en la lernejoj.

Poste okazis la premi-disdonado : nia prezidantino nomis la 7 feliĉajn kaj studemajn lernantinojn kiuj sukcesis ekzamenojn (Atesto pri Lernado aŭ Supera Atesto), ŝi donis al ili librojn en la nomo de la grupo, kaj, kompreneble, gratulis ilin.

La kunveno finiĝis per trinkado, manĝado de kukoj, agrablaj babiladoj.

Dum tro malmulte da tagoj ni havis la grandan plezuron ĝui la restadon de P-ro Pragano en nia urbo.

Peticio : Jam preskaŭ unu milo da subskriboj estas kolektita sed; ĝis nun, estas nur la laboro de tri samideanoj, do ni atendas la foliojn de la aliaj.

Kursoj : Agregacia Profesorino, S-ino Laurenti, gvidas esperantajn kursojn ĉe la junulina liceo Clémenceau (30 lernantinoj). Same, S-inoj Capus kaj Lentaigne, en Liceo Mas de Tesse, gvidas 2 kursojn (entute 25 lernantinoj).

Programo de la unua jarkvarono de 1965 :

1) - la 11-an de januaro : agrabla babilado, peticio,
2) - la 1-an de februaro : letervespero : legado de respondo je nia demando : "Dum manĝo ni trinkas vinon produktitan ĉirkaŭ nia urbo. Ĉu vi trinkas dum la manĝo ? kion ?",
3) - la 1-an de marto : ĝenerala kunveno. Projekto por 1965. Elekto de la estraranoj.

Yvette VIERNE.

## / PERPIGNAN /

Datreveno de Doktoro Zamenhof : En Perpignan okazis, la 15-an de decembro, festeto je la honoro de la datreveno de Doktoro Zamenhof kaj de la Deklaro pri Homaj Rajtoj.

Post prelego de Prezidanto Llech-Walter oni admiris la belajn diapozitivojn kaj la klarigojn de S-ro Lentaigne el Montpellier.

Knabinoj ĉeestis la festeton; ili estas lernantinoj de la eksperimenta kurso en Perpignan. Seminarianinoj, geliceanoj partoprenis ankaŭ tiun manifestacion.

Profesoro Pragano en Perpignan : Post Montpellier, S-ro Pragano, Profesoro pri rumana kaj esperanta lingvoj ĉe la Fakultato de Amsterdam, vizitis Perpignan dum la kristnas-kaj festoj. La Kultura Centro de Esperanto akceptis lin per honora vino.

Kursoj : De la 12-a de januaro, konversacia kurso okazas ĉiun dusemajnon ĉe la Centro (marde je la 9-a vespere).

---

## / U.F.E. : "vitra domo" /

Ĉiuj anoj de nia Unuiĝo povas viziti nian nacian sidejon kaj konstati la gravan laboron efektivigitan de nia konstanta sekretariino, helpata de kelkaj bonvolemaj parizaj gesamideanoj.

Sed ili povas ankaŭ rigardi la libro-tenadon kaj konstati la gravajn elspezojn, rilate la poŝtmarkojn, salajrojn, socian asekuron kaj eldonojn kies kostoj pli kaj pli altiĝas.

Dankon al vi ĉiuj, kiuj sendis kaj daŭre sendas kontribuaĵon al U.F.E. ! Ne forgesu varbi novajn membrojn kaj sendi multajn kotizojn. Nur per via senhalta agado ni sukcesos konservi nian sidejon en Parizo.

## / ĉiam AMIKE kaj TOLEREME /

La vivo estas mallonga, kial do ĉiam grumbli, akralanga paroli, kritiki kun malafableco anstataŭ doni kun ĝentileco konstruajn konsilojn ?

Ni, esperantistoj, ĉampionoj de la paco kaj de la frateco inter la popoloj devas akordigi niajn agojn kaj precipe ni devas esti toleremaj. Kiu faras nenion, neniam eraras !

Sed, komprenu bone ke neniu estas perfekta kaj, estas preferinde agi eĉ kun kelkaj eraretoj anstataŭ esti pantoflemulo ! Kiu ne progresas, retroiras, do ĉiam antaŭen ., sed kun rideto !

Ni malfermas la esperantan ĝentilecan kampanion !

| Kotizoj : | | |
|---|---|---|
| simpla membro | : | rideto |
| aktiva membro | : | rido |
| bonfaranta membro | : | kiso |
| dumviva membro | : | kisego |

La kotizoj oni pagas al Fraŭlino Esperanto aŭ al Apolono-Esperanto - Diskretajn informojn donas la revuo !

via Prezidanto, René LLECH-WALTER.

---

## / NOS CONGRES /

Béziers : Notre congrès fédéral aura lieu, cette année, à Béziers, courant mai. Dans le prochain numéro, nous en donnerons la date exacte ainsi que l'ordre du jour.

Le Havre : Le congrès national se déroulera, lors des fêtes de Pentecôte, les 5, 6 et 7 juin 1965 dans l'un des plus grands ports maritimes français : Le Havre.

Vienne : La Conférence Européenne de l'Espéranto tiendra ses assises dans la capitale de la Valse du 11 au 17 juillet 1965.

Balaruc-les-Bains : La 5-ème Semaine Espérantiste réservée aux campeurs aura lieu à Balaruc-les-Bains (Hérault) du 12 au 19 juillet. Demandez tous renseignements à M. Lentaigne, 3, avenue de la Gaillarde - Montpellier.

Tokio : Enfin, le Congrès international d'espéranto siègera dans la capitale nippone du 31 juillet au 7 août.

## / CONSEILS AUX GROUPES /

Notre Président Llech-Walter a publié une brochure très intéressante "Conseils aux Groupes" qui peut aider utilement dans la vie et le travail d'un groupe espérantiste, ainsi que pour la propagande par sa liste complète du service de librairie. Le prix en est de 2,50 F l'exemplaire.

On peut se le procurer soit au siège de l'U.F.E., 34, rue de Chabrol - Paris - 10 ème, soit au siège de la Fédération d'Espéranto "Languedoc-Roussillon", 5 quai Vauban - Perpignan.

## / COTISATIONS /

Pour faire partie de la grande famille internationale espérantiste, nos jeunes peuvent adhérer à la Fédération comme "Membre-Etudiant" à 3 F par an et recevoir ainsi le "Bulletin d'Informations Mondiales" et "Sudfranca Stelo".

Pour 10 f par an, ils reçoivent en plus la "Revue Française d'Espéranto".

Virer la cotisation au C.C.P. de la Fédération : 956-28 - Montpellier.

## / PETITION "O.N.U." /

N'oubliez-pas de signer et de faire signer à vos parents, amis et connaissances, la pétition à l'O.N.U. en faveur de l'Espéranto.

## / NOS FRAIS D'ENVOI /

Exceptionnellement ce numéro, comportant le programme de la Semaine Culturelle, est envoyé à tous les délégués espérantistes, mais, à partir du prochain numéro, le service ne pourra être fait régulièrement qu'aux abonnés ayant acquitté la somme de 1,50 F, soit par timbres-poste, soit par virement au C.C.P. de la Fédération d'Espéranto "Languedoc-Roussillon" : 956-28 - Montpellier.

## / POUR GRESILLON : AGE MINIMUM = 18 ANS /

Le Ministère de l'Education Nationale nous informe que les participants à la Semaine Culturelle de Pâques à Grésillon doivent être âgés d'au moins 18 ans au 9 avril 1965.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

PROGRAMO de la 4-a KULTURA SEMAJNO
Organizita de Franca Unuiĝo por Esperanto
Sub la aŭspicioj de Ministerio pri Nacia Edukado
En la kastelo "Grésillon" de la 9-a ĝis la 16-a de aprilo 1965

---

Vendredo 9/4
Alveno de la partoprenantoj, interkonatiĝa vespero.

Sabato 10/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
17 h : S-ro DUC-GONINAZ, agregacia profesoro : "La dramaturgio de Puŝkin".
21 h : Marie-Claude TURIN prelegos pri Klasika Muziko (diskoj).

Dimanĉo 11/4
Ekskurso al la kasteloj de Luaro.

Lundo 12/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
16 h : S-ro THIERRY : "Aliaj landoj, aliaj moroj"
17 h : prelegeto de juna eksterlandano kaj debatoj
21 h : S-ro BLANC : "Al fjordoj, troloj kaj meznokta suno en Norvegujo" per diapozitivoj.

Mardo 13/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
16 h : S-ro MARTIN, agregacia profesoro : "Pri lingvistiko"
17 h : prelegeto de juna eksterlandano kaj debatoj
21 h : S-ro BLANC : "Kvieta kaj luksa lando, Svedujo" per diapozitivoj.

Merkredo 14/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
16 h : P-ro JELENC : "Pri naturscienca Temo"
17 h : prelegeto de juna eksterlandano kaj debatoj
21 h : S-ro PRAGANO, Profesoro ĉe la Fakultato de Amsterdam : "Rumanio" per filmo.

Jaŭdo 15/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
16 h : P-ro PRAGANO : "Originala Esperanta Literaturo"
17 h : prelegeto de juna eksterlandano kaj debatoj
21 h : Filmo esperante parolanta : "Angoroj" realigita de S-ro MAHE .

Vendredo 16/4
9 h : praktika esperanto-kurso
11 h : konversacio kaj ludoj
16 h : P-ro PRAGANO : "Kelkaj ĉefverkoj de naciaj literaturoj tradukitaj en Esperanto"
17 h : Raporto pri la Kultura Semajno, legado kaj konkludoj
21 h : Varietea vespero kaj adiaŭa kanto.

-:-:-:-:-:-

Kultura Gvidado : S-roj René LLECH-WALTER, Prezidanto de U.F.E.
Roger BLANC, vic-Prezidanto de U.F.E.

Pedagogia Gvidado : S-ro TURIN, Instruisto kaj S-ino TURIN

Administrado : S-roj BABIN, Profesoro kaj S-ino BABIN
JELENC, Profesoro kaj S-ino JELENC
ROUX, Profesoro kaj S-ino ROUX.

-:-:-:-:-:-